

JARRAPORTO de ESPÉRANTO-FRANCE 2021–2022

Enkonduko	2
1. Konsciigo (Informado)	2
1.1 Gazetara Komunikado	2
1.2 Le Monde de l'Espéranto	2
1.3 Esperanto-Aktiv'	3
1.4 Foiroj	4
2. Kapabligo	5
2.1 Kulturcentroj	5
Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon)	5
Kvinpetalo (Bouresse)	5
2.2 Franca Esperanto-Instituto (FEI)	6
2.3 Interretaj kursoj	6
2.4 KER-ekzamenoj	6
2.5 Komisiono Espéranto à l'école	7
2.6 Afrika agado	7
2.7 Ĝemelaj urboj	8
3. Komunumo	9
3.1 Butiko	9
3.2 Sidejo	10
3.3 Landa kongreso	11
3.4 Preleg-turneoj	11
4. Kunordigado kaj funkciado	12
4.1 Rilatoj kun UEA	12
4.2 Komitato kaj membraro	12
4.3 Financoj	14
5. Jarraportoj de la regionaj asocioj	14
5.1 Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)	14
5.2 Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)	14
5.3 Fédération Espéranto-Centre-Ouest	15
5.4 Fédération Espéranto-Limousin	15
Korezo	15
Altvieno	15
Alie kun la Limoĝianoj	16
5.5 Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio)	16
5.6 Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio)	17
5.7 Fédération Espéranto-Paris-Île-de-France (Parizo-Francilio)	21
5.8 Fédération Espéranto-Provence (Provenco)	24
5.9 Fédération Espéranto-Midi-Pyrénées (Sudo-Pireneoj)	26
6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj	28
6.1 Espéranto-Jeunes (JEFO)	28
6.2 ILEI-Francio	29

Enkonduko

Ĉi-jare denove ni proponas al vi Jaran Raporton de Esperanto-France, prezentatan kaj ordigatan laŭ la strukturo de la laborplano de la estraro de UEA, tio estas laŭ la 4 K: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigado.

Se vi havas demandojn, vi povas fari ilin dum la Ĝenerala membrokunveno okazonta la 7an de majo matene, aŭ skribi al estraro@esperanto-france.org.

Grandan dankon al ĉiuj estraranoj kaj komisiitoj, kiuj kontribuis al la kompilado de la Jara Raporto: Aleks André, Said Baluĉi, Katja Boen, Guy Camy, Raymonde Coquisart, Philippe Cousson Xavier Godivier, Didier Janot, Maurice Juy, François Lo Jacomo, Didier Loison, Edmond Ludwig, Ange Mateo, Clair Mahé, Laure Patas d'Illiers, Emmanuelle Richard, Axel Rousseau, Bert Schumann, Jean-Luc Thibias, Pascal Vilain

Agrablan legadon deziras al vi,

La estraro de Esperanto-France.

1. Konsciigo (Informado)

1.1 Gazetara Komunikado

Multaj artikoloj aperis en la franca gazetaro:

<https://esperanto-france.org/articles-publies-dans-la-presse-en-2021>

Tamen mankas homfortoj por zorgi pri verkado kaj dissendado de novaj gazetaraj komunikoj.

1.2 Le Monde de l'Espéranto

- Ĉefredaktoro: Claude Nourmont (ĝis la numero 609). Grafika laboro : Emmanuelle Richard
- Regule kunlaboras al la aktualaĵoj en la franca aŭ/kaj al la kulturaj paĝoj: Raymonde Coquisart, Lida Gabalda, Mireille Grosjean, Anne Jausions, Didier Loison, François Lo Jacomo, Edmond Ludwig, Flo Martorell, Gilles Tabard, Renée Triolle, la partoprenantoj de diversaj gravaj staĝoj k.a., kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj.
- La tekstojn kontrollegas Yannick Dumoulin, Janine Dumoulin kaj Pascal Villain.
- Danke al laboro de Claude Bensimon, *Le Monde de l'Espéranto* estas nun enretigata en la retejon de Esperanto-France: <https://esperanto-france.org/le-monde-de-l-esperanto>
- En ĉiu numero aperas speciala dosiero (foje en la franca) pri grava temo, franclingvaj kaj esperantlingvaj aktualaĵoj, informoj pri la agadoj, kulturaj paĝoj, laŭeble dulingva paĝo kun traduko de literatura teksto originale verkita en Esperanto, vojaĝaj notoj kaj aliaj rubrikoj.
- Aperis 2 numeroj de septembro 2021 ĝis decembro 2022.
 - Numero 608-609: Lerni Esperanton
 - Numéro 610: Congrès mondial 2022

Raportis Emmanuelle Richard

1.3 Esperanto-Aktiv'

La reta informletero Esperanto-Aktiv', verkita en la franca lingvo, celas aperi ĉiumonate. Espéranto-France dissendas ĝin, de 2010, al ĉiuj membroj kaj al personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto (ĉefe personoj, kiuj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO).

- Pli ol 3000 personoj ricevas la leteron retmesaĝe. Ekde 2022, la letero ne plu estas sendita perpoŝte.
- Vi povas legi la malnovajn leterojn en <https://esperanto-france.org/esperanto-aktiv> kaj proponi al interesitaj personoj senpage aboni laŭ la sama retejo.
- Bonvolu sendi viajn ideojn, sugestojn, artikolojn, anoncojn pri eventoj al teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org

Rubrikoj

- **Découvertes** ("Malkovroj") prezentas temojn rilate al la esperanta movado, al lingvoj aŭ, pli ĝenerale, al kulturaj aferoj, ĉu fundamentajn artikolojn, ĉu intervjuojn de diversaj agantoj de Esperantujo; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.
- **Ils l'ont fait... dans leur région** ("Okazis") listigas la ĵusajn agadojn de la lokaj kluboj; tiun rubrikon prizorgas Raymonde Cocquisart kaj Dominique Lacambre.
→ Post ĉiu evento, bonvolu sendi fotojn kaj artikoleton priskribante la okazaĵojn, la etoson, vian sperto.
- **Calendrier** ("Okazos") vidigas la ĉefajn venontajn eventojn, en Francio, en Eŭropo kaj ankaŭ tra la cetero de la mondo, eĉ plurajn monatojn antaŭe; tiun rubrikon prizorgis Dominique Lacambre.
- **Lu, vu, écouté ce mois-ci** ("Leginda, spektinda, aŭskultinda") prezentas recenzon de ĉu libro, ĉu muzikalbumo, ĉu filmo, freŝe publikigita aŭ pli malnova; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.

Redaktora teamo

Raymonde Coquisart (redaktado de rubriko "Ils l'ont fait..."), Dominique Lacambre (kalendaro), Claude Nourmont, Emmanuelle Richard (teknika spertulo; reteja mastrumado; reta dissendo), Axel Rousseau (kunordigado, redaktado).

En 2022, mankis homfortoj por sukcesi publikigi informleteron ĉiumonate, sed en 2023, denove eblas, kaj la eldono rekomencas en marto 2023.

Listo de artikoloj

Monato	N°	Malkovroj	Leginda, spektinda, aŭskultinda
01/2022	EA 131	Des examens d'espéranto gratuits et en ligne	<i>Manlibro pri instruado de Esperanto</i>
02/2022	EA 132	Entretien avec Said, le nouveau responsable du siège d'Espéranto-France	
04/2022	EA 133		<i>La langue dangereuse, d'Ulrich Lins</i>
09/2022	EA 134	Le congrès mondial d'espéranto de Montréal	
11/2022	EA 135	Entretien avec Amri Wandel, astrophysicien et espérantiste	

1.4. Foiroj

Kiel ĉiujare, Esperanto videblas en diversaj francaj foiroj per ĉeesto grandparte organizata de Esperanto-Francilio. De la 2a ĝis la 5a de junio revenis ĉeeste al la placo Saint-Sulpice la foiro pri matematikaj ludoj. De pluraj jaroj, Esperanto-Francio mendas senpagan budon en tiu ĉi foiro, nun prizorgata de asocio Animath, kies kunfondinto estas François Lo Jacomo. Post du jaroj da virtualaj kongresoj (pro la pandemio), ni ĝuis revenon de la publiko, eĉ pli multnombra kaj interesata pri nia budo ol antaŭe. Ni deĵoris okope (Elisabeth Barbay, Lucien Bresler, Melono = Mélaine Desnos, Pierre Gauthier, Aurélien Lestage, François Lo Jacomo, Didier Loison, Laure Patas d'Illiers), ofte ĉiuj samtempe okupitaj kun pluraj vizitantoj. Same kiel antaŭe ni kreis filmetojn (daŭre spekteblajn) por la virtualaj foiroj, ni pripensu specifan materialon por la estontaj ĉeestaj foiroj pri matematikaj ludoj, sed jam la ludo de Elisabeth Barbay, per kiu ŝi montras, ke du minutoj sufiĉas por lerni nombradon en Esperanto, estis alloga.

Alian senpagan budon oni proponis al ni en Antony, la 25an de junio posttagmeze, en Antony okaze de evento Antony Europa 2022. En malpli granda budo meze de reprezentantoj de plej diversaj eŭropaj landoj, ni kvinope Elisabeth Barbay, Lucien Bresler, Aleks Kadar, Aurélien Lestage, François Lo Jacomo, helpe de libroj, ludoj kaj kakemono, sukcesis informi pri Esperanto per sufiĉe longaj babiladoj kun la publiko, en simpatia etoso. La postan tagon, Interkant, esperanta koruso gvidata de Zdravka Boycheva, partoprenis parizan eventon "Voĉoj ĉe kajoj" (*Voix sur berges*) ĉe kanalo Saint-Martin. Partoprenis kaj ĉeestis membroj de Esperanto-Francio, sed la aranĝo mem estis sendependa de Esperanto-Francio. Pro preparado de la venontjara olimpiko, la "Homara festo" (*Fête de l'Huma*) ne povis okazi en La Courneuve sed en la aviadilejo 217 en Plessis-Pâté, preskaŭ du horojn sude de Parizo. Tamen Esperanto-Francio mendis tie etan (sed pagendan) budon, en la vilaĝo de la libro, kaj tie deĵoris deko da parizanoj, de la 9a ĝis la 11a de septembro. Kelkajn librojn ni vendis, multajn kalendarojn kaj paĝmarkilojn ni disdonis. Granda apuda budo de Pangeo, inĝenierado pri paco, iom helpis nin kaj ankaŭ ĝi reklamis Esperanton.

Tiaj foiroj restas tre grava agadkampo: necesas frue decidi la liston de la foiroj, en kiuj ni povos partopreni (konsiderante kaj la financajn rimedojn kaj la disponeblajn homfortojn), kaj bone fruktigi la ideojn naskitajn dum la pasintaj foiroj por plibonigi nian partoprenon en la estontaj.

Raportis François Lo Jacomo

2. Kapabligo

2.1. Kulturcentroj

Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon)

Espéranto-France plu estas komitatano de Greziljono ekde 2020. Reprezentanto de Espéranto-France: Didier Loison.

Propraj staĝoj

- Entute: 70 tagoj, 2338 tranoktoj, 5485 preparitaj manĝoj, por 309 homoj el kiuj 24 infanoj.
- Printempa kursaro, ĥoro Interkant kaj fervojista renkontiĝo en printempo.
- Maratona kursaro, naturisma semajno, staĝo *Échanges* kaj *Infana semajno* en somero.
- Multaktivecaj staĝoj kun ĥoro Interkant, biciklado kaj *NaturArto* en aprilo kaj oktobro kun 38 personoj
- Staĝo *Aŭtune* kaj ĥoro Interkant en aŭtuno
- Laboroj kun volontuloj okazis dum 54 tagoj por ripari kaj ĝardenumi. Volontuloj bonvenas!
- Nova bruizola kverkaspekta planko en ĉambroj 16 ĝis 19 kaj koridoro

Aliaj okazaĵoj

- Luado al ne-esp-istaj grupoj por financi laborojn: 39 luoj dum 79 noktoj. E-istoj ĝuas rabaton!
- Partnera asocio "FestiNatur" okazigis en julia semajnfino la 2-an festivalon
- Krom nia kutima programo, kursoj kaj aktivaĵoj por infanoj kaj plenkreskuloj, kun gastoj el diversaj landoj kaj amika etoso, ni serĉas E-asociojn kaj aliajn partnerojn, kiuj okazigu en Greziljono siajn proprajn kongreson aŭ staĝojn.

Raportis Bert Schumann

Kvinpetalo (Bouresse)

Ekde 2020, ĉiuj asocioj suferis pro la pandemio, malmultaj aŭ neniuj vojaĝis plu. Ankaŭ niaj planitaj staĝoj ricevis nur kelkajn fidelulojn. Tamen, dank' al tiuj kaj aliaj amikoj, nia centro daŭre vivas. Kial? Tial ke ili subtenis Kvinpetalon per donacoj, malgrandaj kaj ankaŭ grandaj.

Estis speciala alvoko por refaro de unu el la tegmentoj. Sed feliĉe ni ankaŭ ricevis donacojn sen speciala celo, kaj tio helpis pagi la kostojn kiuj plu estis eĉ sen aktivado.

Ni kore dankadas al ĉiuj donacintoj, ĉar ili permesis ke la estonteco de la centro restas malfermita.

Dum preskaŭ du jaroj loĝis en la centro Claudette Triqueneaux kiu kunlaboris volontule en prizorgado de la domoj. Pluraj laboris por farbado de la ŝturoj kaj pordoj. La biblioteko estis prizorgata kaj ordigata. Por tio estis aĉetitaj novaj bretaroj.

Ekde nun, ni bezonas ĉiujn niajn membrojn (kaj novajn) por organizi kaj plenigi stagĝojn en Bouresse. Ni bezonas daŭre donacojn ĉar aliaj tegmentoj atendas renovigon, fenestroj kaj pordoj atendas farbadon, la domoj esperas prizorgadon, la Esperanta kulturo atendas pristudon kaj disvastigon, la Esperantista etoso atendas denovan efektivigon.

Verdire, sen vi, niaj membroj kaj subtenantoj, nia asocio "Société Yvonne Martinot" ne plu kapablos vivi kaj viviĝi nian kulturon.

Raportis Philippe Cousson

2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)

FEI estas lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro, je la dispono de ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj en Francio. Ĝi pretas helpi ne nur en okazigo de ekzamenoj, sed ankaŭ en lingva kontrolo de Esperanto-tekstoj kaj lernolibroj verkitaj de franclingvanoj, aŭ tradukitaj el la franca. Tia kontrolo freŝdate okazis por dulingva porinfana libreto preparata de iu FEI-ano.

2.3. Interretaj kursoj

Espéranto-France mastrumas 3 interretajn kursojn: la programo *Kurso de Esperanto*, la *Cours gratuit d'espéranto en 10 leçons* kaj *Gerda Malaperis* por progresantoj.

34 volontuloj (46 en 2019-2020) korektas tiujn kursojn. Dum la 12 monatoj de oktobro 2020 ĝis septembro 2021, 683 lernantoj aliĝis kaj 42 finlernis la elektitan kurson.

Dum la jaro, ni aldonis 2 ekzamenojn laŭ la KER nivelo (A1 kaj A2). Ni ankaŭ aldonis korektigan servon por lernantoj, kiuj deziras plu lerni Esperanton per la libro *Paŝo al plena posedo*.

Raportis Axel Rousseau

2.4. KER-ekzamenoj

2022 estis grava jaro pri KER-ekzamenoj: C2-nivelan ekzamenon oni lanĉis ne plu kun la Budapeŝta universitato, sed partnere kun la Akademio de Esperanto, same kiel novan eblon trapasi la KER-ekzamenojn rete en la propra hejmo.

Krom tiuj ĉi retaj ekzamenoj, surlokaj ekzamenoj okazis la 26an de novembro (samtempe kiel la Virtuala Kongreso VK3 de UEA) en Parizo, Tuluzo kaj Fleury-les-Aubrais, kun entute 11 kandidatoj, pli ol 10% el la tutmonda kandidataro.

Dum 2022, inter la 187 sukcesintoj en KER-ekzamenoj en la tuta mondo, 25 estis el Francio (13%), kiu do restas la plej grava lando por tiu ekzameno. Tamen Esperanto-Francio ne rekte organizas la francajn sesiojn (sed ĝi subvencias kandidatiĝojn). La parizan novembran sesion organizis la federacio Esperanto-Francilio. Ĉi-jare nombriĝis pli da malsukcesoj ol kutime, interalie ĉar ne estis konata la nivelo de la C2-ekzameno kaj kelkaj pro scivolo deziris provi. Marc Giraud, relative nova esperantisto kaj prezidanto de la federacio Esperanto-Francilio, sukcesis en la kompleta C2-ekzameno.

Raportis François Lo Jacomo

2.5. Komisiono Espéranto à l'école

Post aĉa 2020/2021 lernojaro pro la kronviroza pandemio ni:

- denove povis rekontakti la ministerion pri edukado kaj provis ricevi ties kontentigan respondon al nia jena petado: Esperanto povu esti instruita sen la nepra kaj deviga antaŭa konsento de la rektoroj! Tiu cele, laŭ la tiamaj kontekstoj kaj respondoj ni sesfoje skribis ĉu al la Dgesco (Direction générale de l'enseignement scolaire) ĉu al la ministro mem; intertempe ni ankaŭ, sed vane, alvokadis ilin por respondo. Finfine pasis tempo kaj... nova ministro estis nomumita.
- okaze de tiu nomumo, ni proponis malneton de letero al nia prezidanto por ke li gratulu la novan ministron kaj informu lin je niaj delonga aprobita partnereco (Juneco kaj Populara Edukado) kaj nuna atendo. Bedaŭrinde, tia letero neniam estis sendita...
- partoprenis kaj kontribuis al la Eŭropa konsultado pri la estonteco de EU.
- partoprenis al Eŭropa konferenco pri multlingvismo okazinta en Pau; tie ni sukcesis interveni por informi la ĉeestantaron pri la grava rolo, kiun povus ludi la MLA.
- partoprenis la gravan kaj longtempan korektadon de tiu nova metodo.
- korektigis kaj kompletigis la interesan publikaĵon de S-ro B. Sergent (CNRS): <https://bernardsergent.fr/626-2/>
- tradukis al la franca la flugfolion pri la MLA eldonita far la Eŭropa komisiono.
- pere de la Itala Esperanto Federacio, ne sukcesis malfermi la 2022 Eŭrovizian konkurson per kanto en Esperanto : ankoraŭfoja malsukceso.
- esperigite legis la leterojn de Pap Ndiaye al la geprofesroj (27a de Junio 2022) kaj de Emmanuel Macron al la laborantistaro de la Nacia edukado (16a de septembro 2022)
- ĝojege legis la dispozicion "Notre école, faisons-la ensemble" (Decembro 2022), kiu sen iu ajn dubo ebligas nun, eĉ alvokas!, ĉian eksperimenton kondiĉe plibonigi la sukceson kaj la bonstaton de la gelernantoj kaj malkreskigi la neegalecojn.
- leginte la jam okazantaj eksperimentojn (do akceptitaj kaj subvenciitaj), senhezite konkludas ke nia projekto taŭgas pli bone ol ili: do, nia celo estas atingita!
- konsekvence, kaj eĉ se oni povas dubi pri la sincereco de tiu dispozicio, alvokas nian tutan movadon organizi sin por, almenaŭ en Francio, provi enkonduki Esperanton en kiel eble plej da lernejoj bazaj (per metodo MLA) kaj mezaj (per aliaj metodoj). Bela estonteco por Esperanto dependos de la sukceso de tiuj francaj eksperimentoj.
- tiucele, kaj kvankam lacigitaj pro dekjarlonga strebo, pretus kunlabori.

*Raportis la komisiono Esperanto en la lernejoj
A. André, G. Camy, M. Juy*

2.6. Afrika agado

Temas pri sendado de libroj, materialoj, subtenoj, ktp. en Afriko. Ĝenerale, Espéranto-France kutime rilatas kun Benino, Burundo, RD Kongo, Senegalo, Tanzanio, Ugando kaj Zimbabvo.

Por la jaro 2021-2022, estis nur agadoj en Burundo: sendo por A.N.E.B. (Association Nationale pour l'Espéranto au Burundi), Burundo. Pli malpli 100 artikoloj: ~9 kg kaj ~500 eŭroj valoroj; decido de subteni

la infanlernejon La Espero, en Rumonge, Burundo. Temos pri 1080 eŭroj, ekz. 30 eŭroj ĉiumonate dum 3 jaroj.

Jean-Lucien Mazeau sukcesis je Jeanne-Marie Cash pri respondeco por la programo Afrika agado.

Tiu agado estas ebligata dankal la donaculoj. Oni povas doni: je la sidejo (karto, ĉeko, mono), je la aliĝilo en la rubriko *Dons aux associations / Don pour l'envoi de livres et supports de cours en Afrique*, kaj kompreneble interrete je via sia persa spaco esperanto-france.org/perso > *Cotiser*.

Ni kore dankas ĉiuj homoj kiuj helpas nin, fore kaj surloke tie. Specialan dankon al Renato Corsetti por lia konstanta helpo kaj konsilioj, kaj dankegon al Saïd Balouchi kiu, kiel respondeculo de la Espéranto-France sidejo, zorgas pri la sendadoj.

Raportis Jean-Lucien Mazeau

2.7. Ĝemelaj urboj

Daŭra problemo restas funkciigi veran komisionon pri ĝemelaj urboj. Tamen sukcesoj videblas.

Regule kunvenas geesperantistoj el ĝemelaj urboj i.a. Parizo/Romo, kiu perfekte funkcias. Notinde, ke partoprenas multaj partoprenantoj el diversaj landoj ĉar la du urboj jam vojaĝis rete tra preskaŭ la tuta mondo.

Temoj tre diversaj: ludoj, prelegoj, legoklubo, libera diskuto, kantoj... Notinde kaj gratulinde!

Diversaj aliaj urboj kunvenas sendube en Francio, ekzemple Troyes, Marseille, ktp. sed bedaŭrinde ne sendas raporton pri la agado

Mi ne forgesu la paĝon Fejsbuko, kie daŭre aperigas informojn. En 2021 kiam Mireille Grosjean (Svislando) transdonis tiun taskon, estis 163 ŝatantoj, nun 250 kaj 257 kiuj regule sekvas la ĝisdatigojn de la paĝo Ĝemelaj urboj. Planoj daŭre restas planoj... Denove aperigi informojn sur la UEA Forumo, UEA facila kaj prepari artikolojn por la retejo de Espéranto France sen forgesi la reaperigon de la UEA Bulteno pri Ĝemelaj Urboj redaktita de la eks-delegito Wu Gojang el Ĉinio. Li pretas helpi sed havas novajn respondecojn kadre de loka agado.

Raportis Raymonde Coquisart

3. Komunumo

3.1. Butiko

Reta butiko: butik.esperanto-france.org

Plej bonaj vendoj dum la jaro 2022 (libroj eldonitaj de Esperanto-France estas grasigitaj):

La templo de l' suno	243	2200,07
Metodo 11 (édition 2020)	135	1165,75
Eta Princo	96	956,40
Sur bluaj planedoj (1)	51	661,71
Grand dictionnaire français-espéranto (avec supplément)	59	570,00
PIV 2020 Plena Ilustrita Vortaro	9	540,00
PMEG 2020 (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko)	8	326,04
Cahiers d'exercices Espéranto - Assimil	32	316,80
Espéranto par la méthode directe	31	293,28
Grand dictionnaire Espéranto-français	28	274,00
Ĉiuj Superherooj	23	268,80
Dictionnaire pratique	15	229,60
L'espéranto c'est dans la poche	225	224,00
Stranga malapero	26	217,80
Paŝoj al plena posedo (nova eld.)	8	194,00
Dictionnaire de poche (Poŝvortaro F/E - E/F)	49	192,60
Cours rationnel d'espéranto (éd. 2006)	15	150,00
Baza literatura krestomatio (4a eld.)	5	144,00
Franca antologio (6 volumes)	3	133,67
Manlibro pri instruado de Esperanto	7	126,00

Dum tiu jaro, ni traktis 167 mendojn. 77% de niaj klientoj loĝas en Francio, la cetero loĝas en 18 aliaj landoj.

(1) La libro *Sur Bluaj Planedoj* vendiĝas ankaŭ rekte ĉe lulu.com kaj aliaj retaj librovendejoj:

En 2022, ni vendis per tiuj vendejoj: 33 ekzemplerojn de la presita libro (por neta enspezo de 137,36€) kaj 32 elektronikajn librojn (por neta enspezo de 110,49€).

3.2. Sidejo

La sidejo de Esperanto-France elkore dankas vin pro via subteno dum la jaro 2022!

Malgraŭ la emeritiĝo de nia kompetenta kolego, s-ino Susanna Beglaryan, la sidejo funkciis bone kaj glate kiel pasintaj jaroj, grandparte pro lerta gvido kaj fidela kunlaboro de Susanna.

Nin, en la sidejo, vizitis multaj homoj: Esperantistoj kaj ne Esperantistoj kies petojn ni traktis. Krome, ni ricevis kaj traktis multajn telefon Alvokojn, retmesaĝojn, paperajn korespondojn, Esperanto-rilatajn kaj aliajn administrajn korespondojn kiujn ni dissendis al la koncernaj respondeculoj en la estraro, kasisto, informadiko, Esperanto-Paris (kies sidejo estas samloka kun tiu de Esperanto-France) ktp.

Se iom detale paroli, ni en la sidejo:

- Preparis kaj sendis pli ol 900 mendojn al niaj membroj, klientoj kaj aktivuloj.
- Sendis nian organon LME (*Le Monde de l'Espéranto*) al niaj membroj kaj E-aktivuloj.
- Sendis la invitilon de la Nacia Kongreso, aliĝilon (bulletin d'adhésion 2022-2023).
- Registris pli ol 535 (re)aliĝojn al Esperanto-France.
- Registris pli ol 190 (re)aliĝojn kaj donacojn al UEA.
- Registris pli ol 43 (re)aliĝojn al ILEI.
- Aranĝis pli ol 120 abonojn al internaciaj revuoj.
- Peradis la aliĝon al UK por la membroj kion volis fari pere de ni.
- Raportis la paneojn kaj perturbojn de la sistemo Arthur kaj la retbutiko al la informadikistoj por ada plibonigo.
- Helpis al membroj kiuj ne volis/povis fari siajn membrec/aliĝ-aferojn rete, ke ili faru papere.
- Helpis (nia kolego Régis Fournier) al Pascal Dubourg Glatigny kiu lanĉis la projekton Péraire surbaze de unikaj materialoj de nia arkivo <https://arkivo.esperanto-france.org>

Ĝi estos realigita espereble ĉi jarmfine en universitata retejo. Pri la tuta projekto kaj ĝiaj rilataj retejoj ni informiĝos tuj kiam ili pretos.

Efektive Pascal Dubourg Glatigny faras tion inter sia pli vasta plano enarkivigi ĉiujn Esperanto-arkivojn de Francio. Do, ni petas vian kunlaboron. Se vi havas kaj emas sendi esperantaĵojn inkluzive de E-libroj kaj ĉefe personajn Esperanto-arkivojn, ni volonte akceptos de vi.

Aktuale la Sidejo estas malfermita al la publiko lunde, marde, merkrede (tel.: 01 42 78 68 86).

Ĵaŭdo estas rezervita por trakti la administrajn aferojn, mendojn, membro-slipojn ktp. Sed ni ricevas ankaŭ antaŭviditajn aŭ pasantajn vizitantojn.

Nia regula skipo surloke konsistas el Maria Fessl, Régis Fournier kaj Said Baluĉi sed laŭ la bezono helpis nin ankaŭ Susanna Beglaryan, Jean-Louis Pouillet, Marie-George Cayol-Pouillet, Liliane Bon, Victor Simonnet kaj Méline Desnos.

Kompreneble rete kaj defore (fojfoje eĉ en la sidejo) multe helpis nin Bruno Flochon, Emmanuelle Richard, Sébastien Montagne, Axel Rousseau, Paul Quevy-Lefevre kaj aliaj estraranoj.

Vi estas bonvena dum via vojaĝo al Parizo kaj tra Parizo. Ni plezure montros al vi la sidejon, la arkivon, la librojn kaj respondos al viaj demandoj.

Raportis Said Baluĉi

Varman dankon de la estraro al Said kiu rapide adaptiĝis kaj efike reprenis la torĉon !

3.3. Landa kongreso

En la jaro 2022 okazis la franca landa kongreso en Trélissac, apud Périgueux, de la 26a ĝis la 29a de majo. Entute, pli ol 200 homojn partoprenis la kongreson.

Ili ĝuis riĉan programon de:

- kursoj (fare de Katalin Kovats kaj de Sylvain Lelarge),
- ekskursoj tra la Perigordo, inkluzive de Lascaux (mondfama prahistoria groto kun mirindaj pentraĵoj),
- prelegoj pri Lascaux, pri sciencfikcia literaturo, pri UEA hodiaŭ (fare de Duncan Charters, prezidanto de UEA), ktp.,
- koncerto de JoMo,
- kunsidoj, interalie de Espéranto-France,
- malfermo kaj fermo de la kongreso, pikniko, bufedo, aperitivo, ktp.

Malgraŭ tipaj, probable ne-eviteblaj problemoj (ekz. ne sufiĉe da teleroj dum la bufedo), la etoso estis tre agrable kun bonega vetero en la bela Perigordo kaj la organiza skipo ricevis multajn gratulojn antaŭ ol transmeti la torĉon por la venonta kongreso al la prezidantino de la Liona grupo.

Raportis Ange Mateo

3.4. Preleg-turneoj

Neniu preleg-turneo okazis en la periodo de oktobro 2021 ĝis septembro 2022, pro malsano kaj forpaso de Yves Nicolas kiu zorgis pri ili dum jaroj. Estas nun planata reaktivigi tiun gravan servon de nia asocio.

Raportis Didier Loison

4. Kunordigado kaj funkciado

4.1. Rilatoj kun UEA

Michael-Boris Mandirola estas komitatano A ĉe UEA por reprezenti Espéranto-France por la periodo de 2022 ĝis 2025.

4.2. Komitato kaj membraro

Jaro 2021–2022

Por la jaro 2021, nova komitato estis elektita en majo 2021. La komitato kunvenis kvar fojojn: en majo 2021, en oktobro 2021, en januaro 2022, kaj kunvenos en majo 2022.

Reprezentis la membrojn (2020-2021):

Michèle Abada-Simon • Alex André • Véronique Bichon • Bernard Cornevin • Bruno Flochon • Xavier Godivier • Vincent Jacques • Maurice Juy • Aleks Kadar • Jean-Lucien Mazeau • Paul Quevy-Lefevre • Christine Raiffaud • Emmanuelle Richard • Axel Rousseau • Gilles Tabard

Estraro (2021-2022):

- | | |
|---|----------------------------------|
| • Prezidanto: Bruno Flochon | • Vickasisto: Paul Quevy-Lefevre |
| • Ĝenerala sekretario: Emmanuelle Richard | • Estrarano: Xavier Godivier |
| • Vicsekretario: Axel Rousseau | • Estrarano: Christine Raiffaud |
| • Kasisto: Jean-Lucien Mazeau | |

Reprezentantoj de la membraj asocioj (2021-2022):

- | | |
|--|---|
| • Aŭvernio: Rémi Deneu | • Parizo-Francilio: Marc Giraud |
| • Bretonio: Laurent Peuch | • Poitou-Charentes: M.-F. Condé-Rey |
| • Francilio: Marc Giraud | • Provenco: Thierry Spanjaard |
| • Langvedoko-Rusiljono: Florian Cezard | • JEFO (junuloj): Clément Baleyte |
| • Limuoĝio : Clair Mahé | • FKEA (katolikoj): Bertrand Sajus |
| • Norda Francio: Michel Dechy | • GEE (instruistoj/antoj): Élisabeth Le Dru |
| • Orientfrancio: Gilbert Stammbach | |
| • Poitou-Charentes: M.-F. Condé-Rey | • FET (laboristoj): Flora Markov |
| • Provenco: Pascal Vilain | • FKEA (katolikoj): Michèle Abada-Simon |
| • JEFO (junuloj): Lucas Teyssier | • GEE (instruistoj/antoj): Didier Janot |

Jaro 2022–2023

Por la jaro 2022, nova komitato estis elektita en majo 2022 en Trélissac. La komitato kunvenis kvar fojojn: en majo 2022, en oktobro 2022, en januaro 2023, kaj kunvenos en majo 2023.

Reprezentas la membrojn (2022-2023):

Michèle Abada-Simon • Bernard Cornevin • Bruno Flochon • Maurice Juy • Aleks Kadar •
 Michaël-Boris Mandirola • Jean-Lucien Mazeau • Paul Quevy-Lefevre • Christine Raiffaud •
 Emmanuelle Richard • Axel Rousseau • Gilles Tabard

Estraro (2022-2023):

- Prezidanto: Bruno Flochon
- Ĝenerala sekretario: Emmanuelle Richard
- Vicsekretario: Axel Rousseau
- Kasisto: Paul Quevy-Lefevre
- Vickasisto: Jean-Lucien Mazeau
- Estrarano: Gilles Tabard

Reprezentantoj de la membraj asocioj (2022-2023):

- Aŭvernio: Rémi Deneu
- Bretonio: Laurent Peuch
- Francilio: Pierre Gauthier
- Limoĝio: Clair Mahé
- Norda Francio: Michel Dechy
- Orientfrancio: Jean-Luc Thibias
- Provenco: Thierry Spanjaard
- JEFO (junuloj): Inès Kahin
- GEE (instruistoj/antoj): Didier Janot

Statistikoj

Kelkaj statistikoj pri la membraro kaj la membrara evoluo. Estis 616 membroj je la fino de la periodo 2021-2022 (30a de septembro 2022) kontraŭ 612 membroj je la fino de la periodo 2020-2021 (30a de septembro 2021). Vidu la suban tabelon / grafikon montrantan la evoluon de la membraro ekde 2015-2016.

Federacio	2021-2022	2020-2021	2019-2020	2018-2019	2017-2018	2016-2017
(sen federacio)	32	40	43	34	38	59
Aquitaine	54	55	59	19	66	52
Auvergne	11	13	12	60	12	11
Bourgogne-Franche-Comté	20	16	20	10	23	31
Bretagne	58	29	29	29	35	35
Centre-Ouest	57	57	53	26	50	44
France-Est	41	40	43	58	38	37
Paris-Île-de-France	116	107	108	47	129	118
Languedoc-Roussillon	23	22	29	12	26	25
Midi-Pyrénées	16	16	13	72	11	12
Nord	47	55	64	137	45	32
Normandie	16	17	15	28	22	21
Poitou-Charente	9	9	8	6	7	6
Provence	42	45	44	40	37	38
Rhône-Alpes	74	85	88	95	65	66

4.3. Financoj

Vd. la finanĉan raporton: <https://esperanto-france.org/finances/2022>

5. Jarraportoj de la regionaj asocioj

5.1. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)

Ni ne ricevis raporton.

5.2. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)

La agadoj de la Federacio iom post iom revigliĝas post la malfacilaj antaŭaj jaroj, sed masame laŭ la lokaj grupoj.

Lokaj grupoj aŭ kontaktoj

- Côtes-d'Armor: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Peumerit-Quintin, Lannion, Guingamp, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec, Rostrenen.
- Finistère: Douarnenez, Landerneau, Querrien.
- Ille-et-Vilaine: Rennes, Montfort, Saint-Malo.
- Morbihan: Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.
- Loire-Atlantique : Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint-Aignan de Grand lieu.

Notindas ke la asocioj de departemento Loire-Atlantique ne membras en la federacio laŭstatute ĉar estas en alia administra regiono sed ekzistas regula kunlaboro kun tiuj lokaj kluboj, inter alie pri organizo de prelegturneoj.

Membraro

Ĉirkaŭ 150-200. Inter ili estas 58 membroj kiuj membras ankaŭ en Espéranto-France, el kiuj 43 partoprenas al komuna kotizo de la klubo kun Espéranto-France (Armor Espéranto kaj Espéranto Rennes).

Agoj de la federacio

Prelegturneoj : okazis denove unu prelegturneo en Novembro de Murat Ozdizdar el Turkio. En julio okazis ankaŭ vizito de ukrainino Oksana kaj siaj filinoj, gastigitaj en pluraj urboj de Bretonio. La turneo de Murat kaj la vojaĝo de Oksana estis organizita de Josette.

Eldono de la federacia bulteno *Verda Triskelo* ne okazis dum 2022 sed organiziĝis nova teamo fine de la jaro kun Hélène, Chantal kaj Josette kiuj havas celon eldoni denove 2 numerojn en 2023.

Retejo: <http://bretonio.esperanto-france.org/>

administrantoj: Bert kaj Xavier.

Reta diskutlisto de la membroj, gastigata de Esperanto-France: bretonio@esperanto-france.org kun 205 abonantoj, administrata de Xavier.

Retaj kunvenoj de la komitato por la administrado kaj organizo de la membro-kunveno.

Jara kunveno okazis en Greziljono, la 6an de majo 2022, por profiti la ĉeeston de bretonaj partoprenantoj dum korusa staĝo, kun 13 ĉeestantoj + 2 ne-membroj, inter ili pluraj partoprenis per Interreto.

Aliaj agoj de la lokaj asocioj membroj de la federacio

Kursoj kaj konversaciaj rondoj en pluraj urboj kaj vilaĝoj de nia regiono. Partopreno kiel staĝanoj aŭ organizantoj de pluraj Bretonoj al eventoj en la kulturdomo de Greziljono: bicikla semajno, interkant-staĝoj, somera programo.

Raportis Xavier Godivier

5.3. Fédération Espéranto-Centre-Ouest

Ne ekzistas vigla federacia asocio.

Ni proponas al vi ankaŭ legi la raporton pri la Kultura Esperanto-Centro Grésillon.

5.4. Fédération Espéranto-Limousin

Ĉi-jare la Esperanto-vivo eketis denove en la provinco.

Korezo

Ni organizis kelkajn babilkunvenojn

Budoj en la Foiro de la Asocioj kaj en la Merkato de la Solidarecoj en Brive. Ni kutime partoprenas en la Ekologia Foiro, kiu ne okazis ĉi-jare. Anekdotoj: nia afiŝtabulo apogita kontraŭ la centrurba preĝejo ne estis forprenita, kaj estis videbla dum pluraj monatoj.

Prelego en la mezgrada lernejo d'Arsonval en Brivo, antaŭ 35 lernantoj de 2a nivelo.

Alia antaŭ 11 finklasaj lernantoj. Tri el ili estis volontuloj por eklerni la lingvon.

Ekis du kursetoj. Unu en la Briva biblioteko, alia en la lernejo d'Arsonval.

Altvieno

Septembro 2022. Generala Kunveno de la asocio.

Iniciado al la lingvo Esperanto en la festivalo "Foutez-nous la paix" en Saint-Junien de la 21a ĝis la 31a de oktobro 2021.

La esperantaj kursoj en Saint-Junien daŭris en la domoj de la diversaj partoprenantoj.

Ni festis kiel kutime la Sankta Zaza, ĉi lastan jaron en la domo de esperantistoj.

Lundon la 9an de majo, esperanta renkonto en la sama domo.

Lundon la 27an de junio, pikniko en la ĝardenoj de l'Auzette en Limoĝo.

Ĉi-jare ne eblis partopreni en la forumo de asocioj de Limoĝo.

Alie kun la Limoĝianoj

De la 10a ĝis la 20a de marto, okazis SEMEO en Tuluzo. Kelkaj Limoĝanoj iris.

Pluraj el ni partoprenis en la landa esperanta kongreso de Esperanto-France en Trelissac en majo

Ni estis kvar de Espéranto-Limousin, kiuj partoprenis en la UK de Montrealo ĉi-somere.

Raportis Clair Mahé

5.5. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio)

Regiona kunordigado

Membraro. La Federacio nombras entute 42 membrojn (kp. kun 64 membroj en 2019-2020)

- Araso: 12; Lillo: 17; individuoj-membroj: 9

Bedaŭrinde malaperis la Valenciana klubo kaj ne plu aktivas la Amiena klubo.

La membraro malkreskis, sed estas rimarkinde, ke por la jaro 2022-2023 jam aligis 47 homoj.

Federaciaj kunsidoj. Okazis federacia membrara jarkunveno la 11an de decembro 2022 en la junular-gastejo de Lillo.

Rilato kun UFE. Prezidanto Michel Dechy reprezentis la Nordfrancian Federacion en la komitato de UFE.

Informado kaj komunikado

Bulteno. La Federacio eldonis retan informbultenon *Norda Kuriero*. Ĝi estis sendita papere al federacianoj, kiuj ne uzas Interreton. Ĝi aperis kvarfoje de post la pandemio: en oktobro 2021, marto 2022, julio 2022, decembro 2022.

Retpagaro. La Federacio lancis sian tutnovan retejon ĉe <http://nordafrancio.fr/> kunfandante sian propran retejon kaj tiujn de la membraj kluboj.

La Federacio estas en la sociaj retoj:

- Facebook: www.facebook.com/esperanto.hautsdefrance
- Instagram: <https://www.instagram.com/esperanto.hautsdefrance/>
- Whatsapp: unu grupo por la Federacio kaj unu grupo por la Lilla klubo.

Informado en diversaj medio. Michel Dechy prezentis Esperanton en bazlernejoj de Anglet (64), Fournes-en-Weppes (59) kaj Villeneuve-d'Ascq kaj en la liceo de Gondecourt (59).

Budo sur la stratbazaro de Lillo, sabate la 3an de septembro kaj dimanĉe.

Budo ĉe la foiro pri Asocioj de Villeneuve-d'Ascq la 11an de septembro.

Budo ĉe la Festivalo pri bildrakontoj de Lys-lez-Lannoy, la 12an kaj 13an de novembro.

Prelego en UTL la 22an de novembro pri la temo *Les Congrès Mondiaux dans Le Monde Esperanto* (la Universalaj Kongresoj en Esperantio).

La semajnfino en Pluezek : vendrede la 18an de novembro, prezentado de Eo en 2 klasoj de la bazlernejo ; sabate prelego *Humuro en la verko de Hergé*, dimanĉe ateliero por *instrui pere de La bildstrioj kiel lernolibroj*. Mi estis invitita pro tio ke mi instruis plurfoje en Pluezek Renkontiĝoj, kaj okazis samtempe la jarkunveno de Côtes-d'Armor Esperanto. Dankon al Muriel kaj Jérôme Caré kiuj gastigis min dum 4 tagoj.

Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj kaj staĝoj. Diversajn kursojn organizis la kluboj (lernoĵaro 2019-2020):

- Amieno: ne plu estas kurso, sed homoj renkontiĝas por praktiki la lingvon.
- Araso: kurso ĉiun duan semajnon por 7/8 homoj (komencantoj kaj progresantoj, komuna instruado kaj paroligaj kursoj); la klubo elektas temon, legas artikolon, diskutas...
- Bersée: kurso por 8/10 komencantoj kaj progresantoj
